# Kie ili estas?

Cseh-metoda instruo de la prepozicioj: **sur, sub,** kaj **en**

## I-a paŝo

*Instruisto montras kaj diras*: La tablo estas **sur** la planko.
*Metante novan objekton* :

La skatolo estas **sur** la tablo.
La libro estas **sur** la skatolo.
La kajero estas **sur** la libro.
La gazeto estas **sur** la kajero.

*Kaj tiel plu ĝis la piramido havos 10 objektojn, kiujn oni povas arigi en la ĉambro.*
*La lasta supra objekto estu ekzemple „bildo”.*

*Instruisto*: Kio estas **sur**: la planko, tablo, libro k.t.p.?- *demandas pri ĉiu objekto*.
*Kursanoj* respondas post ĉiu demando per la tuta frazo.

***************************************

La kursanoj diras mem
Sur la ...-o estas ...-o

**Sur** ↑

10 la bildo
9 la tuko
8 la aktujo
7 la ĉapo
6 la sako
5 la gazeto
4 la kajero
3 la libro
2 la skatolo
1 la tablo
0 la planko

## II-a paŝo

La instruisto nur indikas al la objektoj, sekvante la „turon” de sube al la supro.

## III-a paŝo

*La instruisto indikas la supran objekton kaj diras:*

**Sub** la bildo *(indikas la objekton nr. 10)* estas *(indikas la objekton nr. 9)* la tuko.

Kio estas **sub** la bildo?

*Kursanoj* respondas.
La instruisto plu montras suben (9, 8, 7, 6, 5, 4, 3, 2, 1)
Kio estas **sub** la ...-o?
*Demando pri ĉiu objekto.*

***Sub*** ↓

| |
|---|
| 10 |
| 9 |
| 8 |
| 7 |
| 6 |
| 5 |
| 4 |
| 3 |
| 2 |
| 1 |

*******************************************

## Ripeto

*La instruisto nur indikas la objektojn suben (10 – 1) kaj supren (1- 10) kaj kursanoj kune diras mem, ĉiun fojon pli rapide*.

**Ideoj por la paroligo.**

Por diferencigi la objektojn, se estas kelkaj samaj (ekz. libroj) oni povas aldoni adjektivojn: granda, dika, mal..., kolorojn.
Por longigi la respondojn kaj paroligi la kursanojn oni aldonas kelkajn adjektivoj al ĉiu objekto ekz. Sur la granda, dika, verda libro estas maldika, ruĝa tuko k.t.p.
Bone estas arigi pli atrakciajn objektojn, se tio estas ebla.
Kursanoj povas mem aranĝi siajn aĵojn "**sur-sub**" kaj priparoli ilin unuope.

**********************************

**Enkonduko de „en"**

*La Instruisto metas la bildon en la gazeton kaj demandas*:

Instruisto: Ĉu la bildo estas **sur** la gazeto?
Ĉu la bildo estas **sub** la gazeto?
*Kursanoj* respondas negative kaj demandas:"Kie estas la bildo?

*Instruisto*. La bildo estas **en** la gazeto. Kie estas la bildo?
*Kursanoj* respondas.

*La instruisto ripetas la enmetadon per aliaj kaj al aliaj objektoj.*
*Unue li demandas, poste nur montras instigante la kursanojn al longa parolado. Ili devas pli multe paroli ol la instruisto.*

*Instruisto.* Demandu lin /ŝin kio estas en lia / ŝia poŝo, sako, aktujo, buso, kapo, ktp.
Demandu kie li /ŝi loĝas, dormas, laboras, ripozas.

***********************************

**Memorigilo.**

***La versaĵo de Juliano Tuvimo*.**

***Okulvitroj.***

*Kuras, krias Hilario, serĉas siajn okulvitrojn.*
*Serĉas li **en** pantalono, **en** la ŝuoj, **en** kalsono.*
*La vestojn li palpas, ŝovas, tuŝas ĉion – kaj ne trovas.*
*"Ho skandalo! Iu tipo ŝtelis miajn okulvitrojn".*

***Sub** kanapo, **sur** kanapo, serĉas li kun spirohalto,*
*ankaŭ **en** kameno, forno, musa truo ĉe la pordo.*
*Jam la plankon li forŝiras, jam policon li venigas.*
*Ekrigardas li spegulon – kaj ne kredas - tiu ulo...*
*Ili estas. Mirindaĵo! Jes, **sur** lia propra nazo...*

*Tradukis K.D.*